GENERALITAT DE CATALUNYA
PRESIDÈNCIA
COMISSARIAT DE PROPAGANDA
Avinguda 14 d'Abril, 442 bis : BARCELONA : Telèfon 82215

BIBLIOTECA DE CATALUNYA BARCELONA

COMUNICAT DE PREMSA

N-ro 8. Barcelona, 21 Febr. '37.

AL FRANCUJO MANKAS UNU CLEMENCEAU!

Ĉu ni ne estiĝis la adorantoj de"Tigro", al ni ŝajnas, ke jes. Koncerne la malfortecon de nuna franca politiko ni rememorigas al Clemenceau kaj demandas kiun politikon li farus okaze de hispana burĝmilito kaj intervено germana kaj itala ?

Kiun politikon kondukos Francujo, se anstataŭ Blum-Clemenceau estus? Ni scias Clemenceau ne estis revoluciulo. Nenia okaze li ŝatis la socialismon kaj estis inklina nur por kelkaj malfortaj burĝaj reformoj; sed li estis ĉiam spirigita de unu kuraĝa-patriotismo kaj-unu-radikala politiko, kiu tuj apartiĝis de revolucio. Li ŝatis la malproksimon, same kiel la Jakubinoj, la leĝon, lian leĝon, kaj aŭtomatis la pastrojn. Tial li diris la 19a de Julio - kiun Blum ne diris -: La hispanaj respublikanoj estas pravaj do ĉe ilia flanko estas la leĝo kaj malantaŭ la militistojn staras la pastroj. Kaj krom tio - ili estas la Respubliko.

Tiun dirus Clemenceau, ĉar li estis respublikano, eĉ burĝa respublikano, sed tamen respublikano, kiu dum dudek jaroj detruiĝis la oportunistajn ministrejojn kaj detruinte la lastanpostrestaĵon de monarĥio per la starigo de Respublikŏ kaj ĉe tio forlasinte la eklezion, la militistojn kiel maskitajn monarĥistojn.

La hispanaj respublikanoj trovis en li ĉiam unu fratan kunbatalanton, kiu nun en tiuj malfacilaj tagoj ilin denove helpus.

Antaŭ ĉio, en nia miito, Clemenceaŭ vidus la germanojn kiuj la Pirineojn minacas, kiuj en Marokko sin lokiĝas siajn kanonojn turnintajn al markolo de Gibraltar. Sen dubo, Clemenceau dirus; "La Ebro estas la dua Rejno" Ĉu li timus la militon kiel Blum ? Clemenceau, kiu ĉiam batalis, ankaŭ por tiu milito ne timus.

Clemenceau volus nenion scii pri la neinterveno, nek li tolerus, nek li eltenus la interrilatadon germano - italan, pro la lokiĝo de germanoj en Marokko li ne volus kiel malkuraĝulo esti traktata. Ne malpli li konsentus iu internacia kontrolo, depost la defilado de germanoj en Malaga kaj flugado de iliaj flugmaŝinoj super Madrido. Clemenceau vidus germanojn ĉe Rejno kaj Mosel kaj kromĕ ne forgesus, ke la invado ankaŭ el Pireneoj povas okazi. Li estus tiel serioze avertinta, ke Romo kaj Berlino silentus kaj sin oventuale kontentigu je la malgrava armilarkontraŭbando.

GENERALO MIAJA PRI LA SITUACIO ĈE JARAMA.

Generalo Miaja deklaris okaze de la antaŭeniro de la Popolarmeo en sudoriento de Madrido; "La Popolarmeo prenis la iniciaton de batalo en manojn. La malamiko koncentriĝis grandan kvanton de militmaterialo en tiu fronto, tamen la Popolarmeo estas al ĉio preparita.

MANIFESTO DE SOCIALISTA UNUIĜINTA PARTIO KATALUNA.

Sub la titolo »Por la organizo de venko» turnas sin la Unuiĝinta Socialista Partio Kataluna en alvoko al la Kataluna popolo kun la celo de mobilizo de ĉiuj fortoj en la batalo kontraŭ la faŝismo.

Dum sep monatoj montris la sperto pri Madrido kaj la ekzemplo de Malaga, ke nur kun unu disciplina Popolarmeo oni povas kontraŭstari la faŝistajn trupojn. Madrido povis dank al sia disciplinita Popolarmeo tri monatojn kontraŭstari la malamikon; pro tio postulu la popolo ke, ĉie en la lando tiu ekzemplo estu sekvita.

Koncerne la falon de Malaga, kiu per la helpo de italaj kaj germanaj trupoj estis plirapidigita, koncerne la fortan premon de faŝistoj al Madrido postulas la Unuiĝinta Socialista Partio Kataluna kaj kun ĝi la tuta popolo la kreon de regula Popolarmeo, la militservo - devon, kaj la unuecan komandon. La milicanoj devas en Popolarmeon transiri kaj la tuta potenco devas esti en la manoj de Registaro donita.

La tuta civitanaro devas esti militeme instruita. En ĉiuj fabrikoj, en ĉiuj urbkvartaloj kaj vilaĝoj devas sur la bazo de kontraŭfaŝista unueco la militaj instrukcio - kursoj esti organizitaj. Per tiu maniero al la Registaro povas esti centmiloj da instruitaj batalantoj disponitaj. Fortikaj batalionoj oni devas krei, la militindustrio devas kun helpo de puŝtrupoj esti al plej altebla produkcio preninta.

La Partio, devas doni la ekzemplon al la popolo, Partio - membroj, kiuj ne plenumos sian taskon, estos eksiĝitaj kaj al Popoltribunalo donintaj. Krome la Partio tuj mobilizos dekmil Partianoj, kiuj aliĝos al Popolarmeo, donantaj ekzemplon en disciplino, en heroeco kaj oferpreteco.

La anoj de Partio, la kontraŭfaŝistaj organizoj kaj la tuta popolo devas en la momento de serioza realeco esplori nur la demandon de milito. Ĉiuj por la dispono al la Registaro! La plifortigita unueco de nia popolo kontraŭ la entrudulo! Ĉiuj longaj armiloj al la Registaro! Militservdevo! Regula Armeo! kaj Unueckomando! Por unu forta militindustrio! Por la sendependeco de nia patrujo, la patrujo de popolo! Por la kontraŭfaŝista kaj proletara unueco, por la unueco de Hispana Popolo. Tuta potenco por la Popolregistaro kaj Registaro de Katalunujo.

LA VOJO AL LA VENKO.

La malfacileco de la situacio ne povas esti pridubita. La perdo de Malaga, la premanta marŝo de la faŝistoj sur sur Almerio ĉ, estas ŝimptomoj pruvantaj la nepran neceson organizi niajn fortojn. La daŭra elŝipiĝo de italaj kaj germanaj trupoj, la konstanta pasiveco de la demokrataj potencoj devigas nin, ke ni elkonstruu niajn proprajn fortojn.

La situacio estas tre serioza, ĝi estas tiel serioza, ke la kontraŭuloj de mobilizo preskaŭ malaperis. Pro la premo de la cirkonstancoj, ni esperas, ke en la plej mallonga tempo eĉ la lasta el la opoziciantoj sin metos al la batalo. Ni montris per niaj faroj, kie ni apogas la militon kontraŭ la faŝismo. Sed malgraŭ tio, ni komprenas kial la hispanaj laboristoj estas kontraŭaj al la militarta ekzercado. La hispana laboristo estas principe kontraŭmilitarista. Lia malŝato por la militistaj ekzercoj estas justigita. Ĝi neniam estis pli bone pravigita ol nun. Estis kaj estas la kazernoj lernejo de la falseco kaj de la krimo. La perfidaj militistoj donis al ni pruvon pri tio, kiam ili komencis sian atencadan kontraŭ la popolo.

/Fo 8./

Estas sendube, ke kontraŭ kanono ne ekzistas alia pli efika rimedo ol alia sampotenca kanono, kaj kontraŭ organizita militarismo ne ekzistas alia tuŭga rimedo ol alia ankoraŭ pli bone organizita. Jen estas la vidpunkto ol kiu ni oliras, kiam ni rekomendas, ke la hispana proletaro militistigu sin. La militteknikon, la organizita kunagadon de la malamiko pliefikigis siajn atakojn, faciligis al ili siajn venkojn super Malaga, Irun, Toledo, Badajoz, kaj San Sabastian. Se ni vere volas venki, se ni volas neniigi la faŝismon, ni devas organizi nin laŭ la altā formo de la malamiko.

Oni devas kompreni: la revolucion, same kiel la militon, povas gajni nur tiu, kiu estas organizita la plej bone!

(el organo "Solidarida Obrera" anarĥo-sind.)

LA FREMDA OPINIO KAJ HISPANUJO.

FRANCUJO PERDITA DE SIAJ "NACIONALISTOJ"

La falo de Malaga provokis la saman reagon en la kontraŭfaŝistaj vicoj preskaŭ endormiĝintaj sur siaj laŭroj. En eksterlando tiu sortobato,- kiu por ni certe estas bedaŭrinda kaj kiun ni ne klopodos ŝajnigi malgrava, kvankam ĝi estas, kiel Alvarez del Vayo, nur normala okazintaĵo de milito - reatentigis pri la vera senco de la milito, kiu estas internacia. La preno de Malaga estas malpli revolucia malvenko, ol internacia malvenko, aŭ por pli preciziĝi franca - angla. Oni rakontis fabelojn al Hitler, kiam li volis instali sin ĉe Marokko. Ne havante bazojn por sin defendi en la okazo se lia maltoleremo fariĝus dramo, Hitler respondis: Vi ne volas, ke mi transportu miajn hejmdiojn Afrikon kaj ke de tie mi minacu la markolon per miaj kanonoj ? Ne gravas, mi iros instali min en Hispanujon! Kaj li instalis sin en Malaga. La teron de Hispanujo oni ne aĉetas kiel tiun de Afriko je prezo de iaj marĉandadoj. Ne!, ĝin oni simple prenas.

Estas evidente, ke la diktatoroj italaj - germanaj ne prenis la Andaluzian urbon por regali siajn soldategojn per la fama vino. Ne: ĝi estas bazo por operacii sur Afrikon, por preni per la forto tion, kion oni rifuzis al li hierau per notoj kaj marĉandoj diplomataj.

La politika reĝimo de Hispanujo estas io, kio, en esnco, ne interesas la diktatorojn: kion ili volas, tio estas militistaj bazoj. Ankaŭ, kiam iaj francaj naciistoj - kaj ne ĉiuj, ĉar troviĝas inter ili eĉ kelkaj inteligentaj homoj - aplaŭdas pro niaj malvenkoj; kiam homoj el la speco de tiuj de la ĵurnalo "Le Matin", por nur citi tiujn, ĝojas pri la preno de Malaga, pri la pretendita minaco super Madrido (ĉar la lokaj faŝistaj venkoj ne sufiĉas al ili, tiuj francaj super-naciistoj volas pli rapide iri, kaj ili apelacias al la ĉantaĝo je la ĝenerala venko), ni estas surprizitaj, ke la franca registaro ne treĥu ilin al la supera Juĝejo por scii kiu pagas tiajn perfidaĵojn - kiuj estas realaj. Tiuj "naciistoj" Leonir-maniere kaj Bolo-Pacha-maniere renovigas la ĉantaĝon de antaŭ la Eŭropa milito farita kun la cirismo, kiu, kiel oni scias, englutis grandegajn sumojn da mono por fermi la buŝojn al la majstroj ĉantaĝistoj, kiuj helpis ĝin al la detruo de la franca ŝparado. La ĉantaĝo estis, kiel nun, la plej klara konto de profito de la diritaj rabemaj ŝarkoj. Tio ne malhelpas la idojn de la "nacionalistoj" kiuj hierau sin ĵetis al la kaptado de la francaj ŝparaĵoj, akorde kun la kun la despoto de Petrogrado, kraĉi sur la bolŝevikan registaron, kiam ĝi rifuzas la reunspezon de la prunto de la malnova reĝimo. Oni povas diri, ke tiu aro da ekstremaj perfiduloj, por maŝki sian perfidon, reŝovigas kontraŭ Francujo la antaŭan sintenadon. La Hispana Reepubliko ne estas la caro, tiuj ĉampionoj de la perfido ne sukcesos al ĝia ĉantaĝo. Estas la franca Registaro, kiun ni volus demandi: Kial tiuj novaj Leonir kaj Bolo Pacha estas ankoraŭ en la redakcioj de la ĵurnaloj anstataŭ en malliberejo ? Ni tre dizirus ĝin scii, sen kio ni rajtus pensi, ke ĉio estas muzikado, tiel tie

/№ 8./

ĉi en la militaj operacioj, kiel transe en la ĵurnalaj propogandoj. Ĉu eble »Le Matin» estas nur simpla registara aplaŭdistaro ?

LA SOVETA PARTOPRENO EN LA KONTROLO.

Laŭ Reuter, la sub-komitato de ne- interveno atingis interkonsenton pri la Soveta partopreno en la projektita mara kontrolo. Tiu ĉi deman do sugestias la ĵurnalo »Treballi» (organo de PSUC) la sekvantajn prikonsideŕojn;

»Se tiu sciigo estas ĝusta, - kaj ĝi devas esti tia - ĝi nuligas la antaŭhieraŭajn sciigojn de Londono, laŭ kiuj oni kredis malfacila la partopreno n de USSR en la kontrolo de la hispanaj marbordoj - malfacilaĵo, kiu laŭ la spertuloj, staras en la fakto , ke la Soveta ŝiparo ne povas resti izolita en malproksimaj maroj dum kelkaj monatoj, pro manko de bazoj.

Tio estas reale nenio alia, ol politika proteksto, ĉar la germana ŝiparo, - kvankam ne tiel malproksima de siaj bazoj, kiel tiu de USSR -, trovas sin en la sama okazo. Multaj faktoroj povis kontribui al tiu ŝanĝo de sintenado, kaj unu el ili povas esti la malbonaĵo kreita en Francujo kaj Anglujo pro la preno de Malaga kaŭzita de la rekta interveno de ataktrupoj el Germanujo kaj Italujo. Krome,-kaj la diplomata prenoj de la Sovetaj Ambasadoroj en Londono kaj Parizo, donis pli da realiefo al tiuj konsideroj -, la fakto, ke la ĵurnalo de Blum, kiu estas en Francujo la organo de la 2a Internacio en Francujo-, deklaras, ke se Romo kaj Berlino ne ĉesigas tuj sian sabotadon al la paco kaj ke se la internacia kontrolo ne estas tuj starigita, la franca popolo tre bone povas devigi sian registaron malligi sin de la kontraktoj kaj agi en plena liberec o. Tiuj vortoj en la ĵurnalo de la partio de la registara ĉefo, havas sian gravecon kaj ne mankas esti averto.

Dum tiu tempo, tamen, Oliveira Salazer, obeante al la ordonoj de Hitler kaj Mussolini, rifuzas la projekton de kontrolo, kiam kiam Germanujo kaj Italujo sendas siajn respondojn al la Londona Komitato. Lisboño, tiel, ne faras alion, ol sekvi la kondutregulon fiksitan de siaj du majstroj. La estroj de Portugalujo ne volas la kontrolgardon de siaj landlimoj, por ke en la okazo, se la faŝistaj armeoj suferus malfacilaĵojn, ilia teritorio servu denove kiel transitvojo.

Ni vidos ĝis kioma punkto la reprezentantoj de la komitato de Ne - Interveno cedos al la pretendoj de Lisbono. Estas antaŭvideble, ke se Portugalujo ne akceptas la kontrolon de siaj teraj landlimoj, Francujo povas agi same. Ĉiel oni ĉirkaŭiras senfinan rondon kaj oni ne devas formi al si iluziojn. Por ni estas de grandega graveco, ke se la kontrolprojekto efektiviĝas, USSR partopremu en ĝi».

LA TUTA POTENCO POR LA REGISTARO .

Depost la komenco de civitanmilito, ni postulis unu registaron, kiu efektive regas. Ce tiu devizo ĝi ne koncernis kaj ne koncernas unu »fortan» Registaron en plena signifo de vorto, en senso de unu »aŭtoritata» Registaro. Ĝi koncernas nur la Popolregistaron Hispanan, la Popolregistaron Katalunan, kiuj estas la angataŭantoj kaj esprimo de la kontraŭfaŝistaj amasoj, ĉiuj helprimedoj, ĉiu aŭtoritato, por doni ĉiun liberecon de movado. por la milito kontraŭ la faŝismo, organizi kaj venki.

La Registaro en Valencia kaj la »Generalitat» de Katalunujo ne estas instrumentoj kontraŭ, sed la instrumentoj de la popolo mem. De la respublikanoj kaj eĉ de la katolikaj kontraŭfaŝistoj - ĝis je la anarhistoj, estas ĉiuj en tiuj Registaroj reprezentataj. Tiu Regi taro estas nia Registaro, kiu neniajn interesojn, kiel nur niajn de la popolo defendas, el kiu ĝi devenis kaj sur kiun ĝi sin apogas.

N-o 8./

...a milito postulas eksterordinarajn penojn; ĉiuj fortoj devas esti al tiu celo, de venko turnitaj. Kaj ĉiuj tiuj fortoj povas nur tiam plene eklabori, kiam ili estos kunfanditaj kaj kondukitaj de unu Registaro, kie efektive reg... Poliĉo feliĉe ĉiuj kontraŭfaŝistaj organizoj pro la lastaj ... malfeliĉaj okazintaĵoj, pri tiu demando konsentis.

Ankaŭ ĉio devas esti farata, por ke la decidoj de Registaro efektive estu plenumitaj.

La deziro de la popolo, en lando posedi unu veran Registaron, kiu agas kaj siajn decidoj scias efektevigi, kreskas de tago al tago. La popolo, kiu volas la organizadon de milito kaj de venko, postulas la energiajn kondiĉo... , ĝi postulas ke ankaŭ tiuj kondiĉojn estu efektevigitaj.

La popolo postulas la tutan potencon por la Registaro kaj absolutan efektivigon de militservo- devo, la mobilizon, la unueckomandon, la starigon de armeo k.t.p.. Ĝi postulas la efektevigon de tiuj kondiĉoj ne per iu ajn partio, aŭ iu ajn organizo, sed sub la absoluta gvidado de Kataluna Registaro.

La popolo postulas la punadon kaj la sankcion de ĉiuj kiuj klopodos la aŭtoritaton de Registaro subfosi kaj iliajn decidojn malhelpi. La situacio ne permesas la dubadon; ĝi postulas la unuecon kaj la fiksan fidedidon. La popolo estas preta plenumi la ordonojn de Registaro; ĉar tiu Registaro estas la laŭleĝa reprezentanto de tuta popolo.

(El "Treball" organo de PSUC).

POR LA REGULA POPOLARMEO KAJ UNUECKOMANDO.

Depost la falo de Malaga kaj la bombardado de Barcelona multe ŝanĝiĝis. Spontanaj ekzercadoj de soldatoj, milicanoj kaj laboristoj sekvas unu post alia, de ĉiuj flankoj estas postulata la organizo de Popolarmeo, la milita animstato kreskas de tago al tago.

La popolo volas venki kaj la militon kiel eble plej baldaŭ fini. Oni rekonas, ke la sola vojo por atingi tion estas la kreo de Popolarmeo, la unueckomando kaj la fera disciplino. Sekvante la ekzemplon de la boristoj el "General Motors", komencis preskaŭ ĉiuj fabrikoj la starigon de rezervbatalionoj kaj la enkondukadon de militaj instrukcioj por sia personaro.

Sabate kaj Dimanĉe formiĝis ĉie en la urbo grupoj de laboristoj kaj soldatoj, kiuj sur la publikaj placoj kaj stratoj faris militistajn ekzercadojn. Oftfoje el la amasoj eliris diversaj oratoroj, kiuj per mallongaj paroladoj montris la neĉesecon de nuntempo. La demonstracioj tra la ĉefstratoj de urbo, de civilistoj kaj en militservo estantaj laboristoj, postulis la Popolarmeon, la unueckomandon kaj la ĝeneralan militservdevon, same kiel ĉiuj ekzaktaj deklaroj de la Registaro.

R I M A R K O J.

Al ĉiuj, kiuj sendis al ni gazetojn, leterojn, eltranĉaĵojn ktp., ni tre dankas.

Ĉiuj estas petataj sendi al ni adresojn de ĵurnaloj, kiuj estas pretaj niajn oficialajn sciigojn represi.

La esperantistojn ni petas diskonigi niajn bultenojn kaj ilian enhavon aperigi en sia nacilingva gazetaro, sendante al ni unu ekzempleron.

Ĉiuj korespondaĵojn bonvolu sendi al; COMISSARIAAT de PROPAGANDA, 14, de Abril, 442 bis, Barcelona, Hispanujo. (ESPERANTO - FAKO).
